

ESPERANTO-INFORMILO



© de sspiehs3 ĉe Pixabay

Rubrikoj ĉi-numere:

- Programo
- El la klubo
- Temo
- Literaturaĵo
- Diversaĵoj

Kiel kutime, por julio/aŭgusto atendas vin duobla eldono de la Informilo.

Kolofono

redaktoro: Anina Stecay
as.esperanto@web.de
korektinto: R. Pflüger

Esperanto-Gesellschaft Frankfurt am Main

www.esperanto-frankfurt.de

Vorsitzender: Martin Schmitt
Gießener Str. 18
35415 Pohlheim
Tel. 06403/ 9690878

Bankverbindung:

Esperanto-Gesellschaft F.a.M
IBAN: DE75 5008 0000 0771 5717 01
BIC: DRESDEFFXXX
bei: Commerzbank Frankfurt

Jahresbeitrag

mit DEB-Beitrag: 96 €
Familienmitglied: 48 €
Nur ESF: 24 €
Familienmitglied: 12 €

Programo Julio/Aŭgusto

Klubvespero

Donnerstag, d. 1. Juli 21

19:00 h (in Zoom)

Spiel „Nur unu“ (M. Schmitt)

Dieses unterhaltsame und beliebte Spiel haben wir schon ein- oder zweimal gespielt (und auch andere Klubs haben es schon auf dem Programm gehabt), so dass meisten derjenigen, die regelmäßig an den Zoom-Treffen teilnehmen, es schon kennen werden. Wer es noch nie gespielt hat – unbedingt mitmachen und kennenlernen!

Donnerstag, d. 5. August 21

19:00 (in Zoom)

Aus Fehlern lernen (A. Stecay)

Wir schauen uns Sätze von guten Esperantosprechern an, die trotzdem Fehler enthalten – wo sind die Fallstricke? Anhand der Fehler gehen wir dann auch auf den grammatikalischen Hintergrund ein.

Klub-Abend

Ĵaŭdo, la 1-an de julio 21

19:00 (per Zoom)

Ludo „Nur unu“ (M. Schmitt)

Tiun amuzan kaj ŝatatan ludon ni jam kelkfoje ludis (kaj ankaŭ aliaj kluboj foje proponis ĝin), do ĉiuj regulaj partoprenantoj de niaj Zoom-renkontiĝoj verŝajne jam konas ĝin. La aliaj – partoprenu por ekkoni ĝin!

Ĵaŭdo, la 5-an de aŭgusto 21

19:00 (per Zoom)

Lerni el eraroj (A. Stecay)

Ni rigardas frazojn de spertaj lingvouzantoj tamen erarajn – kie estas la kaptiloj? Surbaze de la eraroj ni pridiskutas la gramatikan fonon.

El la Klubo

La unua persona renkontiĝo post 16 monatoj!

La 22-an de junio okazis la unua post- (aŭ dum-?) pandemia persona renkontiĝo de la klubo – en formo de la neoficiala, babila rondo, kiu laŭplane okazas ĉiun kvaran mardon en la monato kaj kutime situas en Stattcafé. Ĉi-foje ni tamen elektis kiel lokon la bierĝardenon „Dionysos“ troviĝantan tre proksime ĉe la domo *Musikübungszentrum*, kie ekde nun okazos ankaŭ niaj ĵaŭdaj kunvenoj.

Partoprenis en gaja etoso, ĝuante grekan manĝaĵojn, Ernst, Frank, Thomas, Hilde, s-ro Ullmann, Martin, Ulrich kaj Anina. La loko tre plaĉis al ni, kaj ni esperas, ke dum tiu somero ni povas havi pliajn surlokajn renkontiĝojn. Tamen ĝis kiam niaj klubaj renkontiĝoj povos okazi kiel kutime, estas ankoraŭ kelkaj aferoj ordigendaj – interalie ni devas fiksi niajn rendevutagojn kun „Saalbau“-asocio.



© foto: AS

Naskiĝtagoj

En julio festos siajn naskiĝtagojn:

Dr. Robert Bittner, 06.07.
Katarina Eckstädt, 09.07.

En aŭgusto festas siajn naskiĝtagojn:

Klaus Rumrich, 01.08.
Anina Stecay 29.08.

Ni kore gratulas!

Retrorigardo al nia dumpandemia programo

Malgraŭ la malhelpado far la kronviruso, ESF dum la ĝis nun 16 monatoj de la pandemio sukcesis vivteni regulan programon. Kun bunta enhavo, de ludoj tra lingvaj rondoj ĝis prelegoj ni laŭeble plej diligente provis ŝtopi la truon, kiun kreis la trudizoliĝo por Esperantujo.

La laboron organizi kaj prepari la programon dum la pandemio dividis inter si nur manpleno da homoj. Dum en la ĉeestaj klubkunvenoj ja almenaŭ troveblas 7-8 perso-


noj, kiuj foje kontribuas per iuj programeroj, dum la komputilaj renkontiĝoj tiu nombro eĉ ŝrumpis al la duono, pli mapli. La grafikaĵo montras la aktivan programpreparadon de la klubanoj dum la lastaj du jaroj.

Ni iam en 2020 do reduktis la programon al nur unu programero dum ĉiu verspero – do okazis aŭ nur ludo aŭ nur prelego ktp.

Fakto, kio estas samtempe fieriga (ĉar ĝi pravas, kiom interese tamen restis la ESF-programo spite al

la malfavoraj kondiĉoj) kaj iom elreviĝa (ĉar ĝi montras relativan indiferentecon flanke de la propraj klubanoj) estas la fakto, ke inter la ĝis 35 partoprenantoj de la klubvesperoj la klubanoj ne malofte estis la minoritato. Tion eĉ ne povis ŝanĝi la teknika subteno, kiun prezidanto

Martin proponis al ĉiuj klubanoj, kiuj ne tiom spertas pri komputiloj. Tion ŝancon bedaŭrinde apenaŭ iu eluzis. Ĝojige estis tamen dum la jaro, ke kelkaj



gastoj partoprenis kun ioma reguleco, ekzemple de nia ĝemela klubo en Liono, tiel ke oni povis vere interkonatiĝi.

Ni esperas, ke io restos el tiu engaĝiĝo ankaŭ post la pandemia tempo, kaj ke iom post iom ankaŭ la retiriĝintaj klubanoj revigliĝos por antaŭenigi la kluban vivon – ĉar finfine, ni ĉiuj konsistigas la klubon. Ĉio dependas de ni. Aŭ pli bone: se ni unuopuloj ne faras ion, „la klubo“ ne prosperos. Eble mi tro pesimismas, sed mi timas, ke dependante de nur kvin aktivuloj, eĉ ĝia ekzisto post certa tempo minacatos.

Temo

Netradukeblaj vortoj

Kelkaj vortoj ekzistas unikaj en nur unu lingvo/lingvofamilio. Ili estas specife trafaj por iu tuthomara sperto, tamen – strange – neniam inventitaj en aliaj lingvoj (almenaŭ en aliaj lingvoj oni povas vortumi ilin nur iom pli komplike).

Foje oni ĝuste pro tiu „trafeco“ transprenas ilin en aliajn lingvojn, foje ne.

Pro la ofte primokita trajto de la germana lingvo, ke oni povas kunmeti preskaŭ iujn ajn vortojn kaj ricevi uzeblan novan vorton, en la germana ekzistas sufiĉe multaj vortoj,

kiuj ne havas rektan ekvivalenton en aliaj lingvoj (sed nur plurvortan esprimon aŭ pli komplikan priskribon de la afero).

Foje tiuj netradukeblaj vortoj estas ankaŭ faritaj figurasence.

Sed kompreneble ankaŭ en aliaj lingvoj kaj kulturoj ekzistas vortoj, pri kiuj legante vi demandos vin, kiel vi iam povis vivi sen havi ĝuste tiun esprimon...?

Mi esperas amuzi vin per kolekto de kelkaj tiaj vortoj.

Vorto		laŭvorta traduko	signifo
Kummerspeck	D	malĝojolardo	La trodikeco ricevata se vi manĝas pro malĝojo, timo aŭ frustracio.
Dunkelziffer	D	malhela cifero	La taksita kvanto kiom ofte okazas iu krimo sen oficiala raporto. ¹
Spätzünder	D	malfrueksplodanto	Persono, kiu tre malfrue kaptas ion aŭ kiu ĝenerale bezonas longe por evolui
Torschlusspanik	D	pordegofermiĝopaniko	La subita timo kiun oni sentas komprenante, ke iu afero alproksimiĝas al sia fino, kaj ke ĉiu decido/agado pri ĝi nun estos definitiva. (Ofte uzata en kunteksto kun gravediĝo kaj proksimiĝanta menopaŭzo).
Hinterland	D	malantaŭa lando	Teritorio ĉirkaŭ iu metropolo aŭ grava regiono, plej ofte infrastrukture malfavora kaj enloĝata de relative malmultaj homoj. Transprenita idente en la anglan (<i>the hinterland</i>), hispanan, francan kaj portugalan!
natafelen	NL	postmanĝi	Resti sidantaj ĉe la tablo post la manĝado kaj babili kaj simple ĝui la etoson.
uitwaaien	NL	elblov(iĝ)i	ĝui freŝan aeron/venton ekstere En la germana proksimume „frische Luft schnappen“, sich den Wind um die Nase wehen lassen“, sed tiu esprimoj estas ja tamen pli pezaj.
trepverter	jid	Ŝtuparaj vortoj	La rimarkigoj/frazoj kiujn vi povus esti uzantaj en situacio ĵus pasinta (kaj kiuj nun, kiam ili fine venas al via kapo, ne plu estas utilaj).
mysa	sv	---	senti sin komforta, kontenta kaj gaja en sia hejmo
tsundoku	jap	stoki-legi	La kutimo aĉeti librojn kaj fine ne legi ilin, sed meti ilin kun la aliaj sur stokon

¹ Ĝi ekzistas ankaŭ en aliaj ĝermanaj lingvoj, ekz. en la sveda (mörkertaal). Interese, ke en la nederlanda oni kreis „dark number“ kvazaŭ kiel rektan anglan tradukon de la germana vorto, dum en la angla mem ĝi tamen esprimiĝas kiel „dark figure of crime“. Aliaj lingvoj uzas esprimon kiel „kaŝita krimeco“, „nigra cifero“ (en du vortoj) kaj simile.

² Ĝi fakte estas kofrovorto el *tsunde-oku* (stoki kaj forlasi aĵojn) kaj *dokusho* (legi librojn). Ĉe tiu traduko helpis Reinhard Pflüger, Ulrich Fellmann & Vikipedio

Ĉu vi povas pensi pri iu esperantaj vortoj, kiuj ne ekzistas same kurtaj kaj trafaj en via lingvo? Kiujn?

Restaŭraciaj kondutmanieroj

de Felmano Ulriko

"Kaj ne forgesu: vi dum la manĝado neniam ŝmacu! Eŭropano neniam produktus eĉ la plej mallaŭtan sonon!" La junulinoj fervore kapjesis. Najbartable sidis eŭropece aspektanta "gajĝin", kiu evidente havis iom pli da pezo ol estis en Japanujo normale. Servistino ĵus estis alportinta grandan teleron plene da spagetoj.

La junulinoj devis ripeti la bazajn regulojn de la eŭropstila tablokondutaro, la dika najbaro kun la ruĝecaj vangoj kaj la longa nazo estis surmetanta sian manĝotukon, kiel ankaŭ ili en la kondutkurso pri la eŭropa vivstilo estis lernintaj. Estis ja tiom malfacile ĝuste konduki en eksterlando, precipe en Eŭropo, la pinta kulturo rilate arto, manĝo kaj bonkonduto. Estis do nepra afero partopreni tiajn instrulekcionojn antaŭ ol vojaĝi la unuan fojon Eŭropon por mem vidi (kaj foti) la Eiffelturon en Parizo, la romantikajn kastelojn en Hajdelbergo kaj Nojŝvanŝtajn, la Koloseon en Romo. Tiuj eksterlandanoj estas ja tiom altkulturaj homoj, ke oni intense prepariĝu por ne perdi la vizaĝon.

Du servistinoj nun alportis la manĝoplenajn telerojn por la japaninoj. Eŭropstila manĝaĵo, kompreneble, en tiu eŭropstila restoracio.

La najbaro nun slurpis. Ĉiuj junulinoj rimarkis kaj koncentriĝis al ne rigardi lin. La instruistino ĵus estis ripetinta la vorton "neniam ...", kurte paŭzis, poste daŭrigis la frazon.

Nun li ekŝmacis. Ĉiuj fiksrigardis siajn proprajn telerojn. La instruistino, nun iom pli laŭte, ripetis la instruadon pri la uzo de la manĝilaro. "Ĉiam la forko situas maldekstre, la tranĉilo..." - li nun trinkis, kaj dum tio

faris ĝenajn sonojn. La instruistino eĉ pli laŭte daŭrigis. Post la ripetado de la tuta regularo pri manĝiloj, la vicigo, la uzo kaj la nepre evitendaj agoj, ŝi denove diris: "oni ne aŭdu vin manĝi! Tute ne!" La viro nun ruktis. La korpoj de la junulinoj rigidiĝis. Dum la longnazulo evidente bonsentis, kaj ĝuis sian manĝaĵon, la lernulara tablo estis en malagrabla etoso.

"Bonan apetiton!" la instruistino nun diris. Ĉiuj ekprenis jemane po manĝilon, kaj koncentriĝis al la tasko manĝi laŭregule eŭropstile. Ŝmaceto tamen okazis, kaj la instruistino kritike rigardis ĉiujn.

"Neniam!" ŝi diris. Estis malfacile, post tutviva senproblema dummanĝa ŝmacado ne produkti sonon. La fremdulo tamen daŭrigis produkti sonojn. Pro la silento je la najbaraj tabloj kaj tiu de la junulina kurso, oni ilin perceptis eĉ pli laŭtaj kaj ĝenaj.

Hanako nun ŝmacis denove. Kaj meze dum la frazo de la instruistino "Neniam eŭropano farus!" la najbara gajĝin meze de ŝmacado denove ruktis. Tio ŝanĝis ĉion. Rompis barilon.

La instruistino nun fiksrigardis tiun regulignoran eŭropecan eksterlandanon, dum li ensuĉis multajn spagetojn en sian grandan buŝon. Kaj kiam ŝi ankoraŭ pensis pri tio, kion ŝi diru, ŝi aŭdis ŝmacadon sur la propra tablo. Hanako rezignis pri la regulo kaj nun entuziasme kaj kontraŭregule rapide manĝis, kvazaŭ kopiante la najbaran rolmodelon. La instruistino ankoraŭ ŝokite pensis, per kiuj vortoj nun aŭtoritatece kondamni tion, kiam unu post la alia de la junulinoj komencis ŝmacante provi kaj ĝui sian manĝaĵon.

Rimarkigoj (de la aŭtoro):

1) La ideon por la rakonto mi ŝtelis el la japana filmo *Tampopo*, kiun mi taksas kiel nepra vido por ĉiu, kiu interesiĝas pri la japana kulturo. Ĝi ankaŭ estas en mia listo de la dudek plej bonaj filmoj de mia vivo.

2) La verbon "slurpi" mi en miaj vortaroj kaj en reta PIVo ne trovis, ŝajnas ke mankas en Esperanto trafa esprimo. Vortaroj tradukas la germanlingvan vorton *schlürfen* (t.e. sorbi kun laŭta malagrabla sono) - miaopinie mise - per "ŝmace sorbi". Sed ŝmaci estas tute alia ago kaj alia sono. Ĉar Guglotraduk' proponas la vorton slurp, mi prove prenis ĝin, kvankam Guglotraduk' ofte anstataŭigas mankantan vorton simple per angla vorto. Ĉu iu scias pli bonan solvon?

3) Franca esperantisto-amiko atentigis min pri tio, ke "*En fama kanzono sia, franclingva, la kanzonisto Jacques Brel uzas la onomatopeon "fichss" (foje skribita "shlls") por persono kiu brue manĝas sian supon. Sed "fichssi" kaj "shllsi" estus strangaspektaj kaj ne facile prononceblaj verboj.*" Al mi tre plaĉas tiuj onomatopoeziaĵoj de Ĵak Brel.

Diversaĵoj

Enigmo

Krucvortenigmo (ensendita de Klaus Rumrich)

En okazo de substantivoj, la o-finaĵoj povas esti ellasitaj.

Se vi ĝuste ordigas la literojn el la grizaj kampoj, vi ricevos solvovorton.

1	2	3	4		5		6		7	8	9	10
11				12			13	14				
15			16			17					18	
19		20		21						22		
	23		24					25	26			
27					28		29		30			31
		32					33					
34	35				36	37			38		39	
	40			41				42				
43				44	45		46			47		48
49			50						51		52	
53		54					55			56		
57					58				59			

Horizontale:

- | | |
|-----------------------------------|-------------------------------|
| 1 Korpomalvarmigilo | 33 Kio ankoraŭ plue estas |
| 5 Respektoplena al Dio | 34 Ilo por regi la flukvanton |
| 7 Kripla | 36 Vintra sportilo |
| 11 Inklina ne mensogi | 38 Speco de kuko |
| 13 Ĝusta komprenado | 40 De la komenco de |
| 15 Sufikso | 42 Normale funkcianta |
| 16 Spite | 43 Ĝisnuna vivdaŭro |
| 18 Pronomo | 44 Ne plu havi |
| 19 Videblaj elektromagnetaj ondoj | 47 Vicorda nombrovorto |
| 21 Longa periodo | 49 Pronomo |
| 22 Nedaŭra kaprica kutimo | 50 Pikinsekto |
| 23 Malplenaĵo en solida korpo | 52 Flava metalo |
| 25 Muzika teatraĵo | 53 Sespieda besto |
| 27 Havi ideon pri ies identeco | 55 Longa mallarĝa teksaĵo |
| 28 mll: respondkupono | 57 Maltago |
| 30 Posesivo | 58 Agi kaŭzante |
| 32 Lavilo | 59 Meblo por dormi |

Vertikale:

- | | |
|---|--|
| 1 Dikiĝo | 28 Gutoj sur vegetaĵoj |
| 2 Elkreskaĵo de la haŭto | 29 Forta voĉado |
| 3 Movo en ian direkton | 31 Homa kreokapablo |
| 4 Pri kio estas parolata | 35 Ŝakfiguro |
| 5 Senkolora | 37 Ŝtopilo por botelo |
| 6 Tranĉa aŭ pika | 39 Historio; Fabelo |
| 7 Vorteto por montri vojon | 41 Jararo |
| 8 Sufikso pri kolekto | 42 Loko rilata al la ĉirkaŭaj objektoj |
| 9 Konservoj en la menso | 43 Parenco |
| 10 Malbazo | 45 Ekzisti |
| 12 Monato | 46 Voĉe komuniki |
| 14 Mevo | 48 Varmego |
| 17 Aro da samspecaĵoj | 50 Faro ke io estu ie |
| 20 Ujo kiun virinoj portas ordinaraj sub la brako | 51 Sufikso |
| 22 Parto de vizaĝo | 54 Landokodo de Slovakujo |
| 24 Bestaĵo | 56 mll: artefarita intelekto |
| 26 Pli malfrua | |
| 27 Korta birdo | |

Solvo de la junia enigmo

La solvo de la enigmo estis **dimanĉo**.

Jen la eldiroj de la personoj:

Hodiaŭ estas...

A: Lundo

B: Merkredo

C: Mardo

D: Merkredo

E: nek lundo, nek mardo, nek merkredo

F: vendredo

G: ne dimanĉo

Pro G, ne povas esti ke A, B, C, D, aŭ F pravus (ĉar en tiu okazo pli ol unu persono pravus). Do, estas nek lundo, nek merkredo, nek mardo, nek vendredo kaj sekve E pravus. Ĉar nur unu el ili pravus, G devas malpravi kaj hodiaŭ estas dimanĉo.

Klaus Rumrich ĉi-foje liveris la ĝustan solvon kiel unua post nur kelkaj minutoj; ankoraŭ la saman tagon ensendis same ĝuste la solvon Reinhard Pflüger.

Gratulon!

Vorto de la monato

Hodiaŭ mi volas prezenti 3 sendube konatajn al vi vortojn en kunteksto, ĉar ili estas foje intermiksitaj:

konkuri (ntr): *peni superi alian, kiu havas la saman difinitan celon*, laŭ NPIV

- **konkurenci** (ntr): konkuri sur la kampo de negoco, komerco, industrio (do, subnocio de konkuri)
- **konkursi** (ntr): partopreni en konkurso, t.e. konkuri laŭ antaŭaranĝitaj reguloj, kun juĝantoj kaj kun rekompencoj/premioj (ofte en la kampo de sporto, arto ktp.)

Ŝerco

Juna klerikulo vizitas la katolikan episkopon kaj rimarkas ties junan kaj escepte belan mastrumantaron. La episkopo vidas la rigardon kaj diras al la junulo: „Mi supozas, ke mi konas viajn pensojn, sed ne tiel estas. Ŝi vere prizorgas nur mian domon.“

Semajnon poste la mastrumantino iras al la episkopo. „Mi treege bedaŭras, sed ekde kiam vizitis nin la juna klerikulo, en la manĝilaro mankas ora forko.“

La episkopo tuj skribas leteron al la junulo, dirante: „Kara juna amiko! Mi ne asertas, ke vi ŝtelis nian oran forkon, nek mi asertas, ke vi ne ŝtelis ĝin. Sed ĉiukaze ĝi perdiĝis.“

Semajnon poste venas la responda letero de la junulo: „Kara eminenco! Mi ne asertas, ke vi seksumas kun via mastrumantino, nek mi asertas, ke vi ne seksumas kun ŝi. Sed restas la fakto, ke se vi dormus en via propra lito, vi ĉiukaze estus trovinta la oran forkon.“